Raporto de la Prezidanto

Saluton, samideanoj!

En la pasinta jaro, ni faris kelkajn ŝanĝojn en ELNA. Du malsamilaj ideoj frontas nin. Unu estas nia kutima funkciado, ĉe la Centra Oficejo, en la libroservo, en nia bulteno Esperanto-USA, la decidoj en la estraro, kaj la laboro, kiun la komitatoj kaj komisiitoj faras. Tio estas la labormetodo, kiun la gvidantoj de ELNA uzas jam dum 55 jaroj. Tamen, en la hodiaŭan mondon venis la interreto. Iu ajn, kiu havas konektitan komputilan, povas legi pri Esperanto, kaj eĉ lerni en lecionoj per lernu.net aŭ retmesaĝe kun fora instruisto. La bezono de membreco en ELNA ne estas tiel evidenta kiel antaŭe. La moderna teknologio portas ŝanĝojn, kaj ni devas trovi la ĝustajn decidojn por kapti la avantaĝojn de la interreto, dum samtempe ni konservas la kutimajn metodojn, kiuj servas bone jam dum multaj jaroj.

Ni faras nian egalecon inter la du kampoj kiel eble plej saĝe. Ekzemple, kiam ni ŝanĝis la retpaĝaron, ni klopodis multe zorgi por ne perdi la malnovajn informojn el la malnovaj retpaĝoj.

La interreto estas bonega afero por la Esperanto movado. Ni bonŝance havas estraranojn, kiuj pensis bone kaj sperte pri teknikaj aferoj kaj havas bonan bildon pri kiel la interreto en la nova mondo helpas kaj povos helpi al ELNA. Mi aparte dankas al Dr. Steven Brewer kaj Dr. Robert Read pro ties laboro. Steven estras nia retpaĝaron nun. Malgraŭ tio, ke ni kuraĝe eniras la interran epokon, ni neniam lasos tiun mondon, kiu ne havas interretan konekton. La interreto aldonas novajn eblecojn, sed ni ne nuligas nian rilaton kun aliaj membroj.

Ni daŭras kun niaj kutimaj klopodoj, kun lokaj grupoj, kun regionaj kaj landaj kongresoj, nia instruado, informado al la publiko, respondo al informpetintoj, ktp.

Mi dankas al vi kaj niaj multaj pacaj batalantoj en la kunlaboro por pli bona mondo.

- Filipo DORCAS, julio, 2007